

# AVANGO

1990/1

Oficiala Organo de Kuba Esperanto Asocio

## Enhavo

<i>Al la legantoj</i> .....	2
<i>Infloresko</i> .....	3
<i>Quivicán, se temi pri avangardo</i> .....	4
<i>Biografio de la Alta Protektanto 75a UK</i> .....	5-6
<i>AvancKonkurso</i> .....	6
<i>Kultura panoramo</i> .....	7-9
<i>Librofoire en Havano</i> .....	10
<i>Kongresa paĝo</i> .....	11-12
<i>Se temas pri junuloj</i> ... ..	12
<i>RHK-paĝo</i> .....	13
<i>La lingvo mem</i> .....	14-16

## AVANCO

*Organo de  
Kuba Esperanto-Asocio*

*Aperas kvarfoje jare*

**Adreso:**  
**Poŝtfako 2018**  
**10200 Havano, Kubo**

**Ĉefredaktorino**  
Maritza Gutiérrez G.

**Redaktoroj**  
Orlando Raola G.  
Alberto F. Calienes

**Ekspedas**  
Oficejo de KEA



# 75a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO HAVANO 1990

*Estimataj gelegantoj!*

*Jen la unua numero ĉi-jara, akceptu ĝin tutkore, ĉar ni multe strebis por doni al vi kiom eble plej informplenan gazeton. Voru ĝin per okulaj flamoj, sentu ke ĝiaj paĝoj kvazaŭ semante tuŝas vin. Se io malplaĉe eniras vian koron, tuj reagu, ĉar ĝi estas via tribuno. Nu, sen io plia mi invitas vin foliumi ĝin.*

*la redaktorino*

# INFLORESKO

MARITZA GUTIÉRREZ G.

Verŝajne estus interese iam esplori la anim-staton de LKK antaŭ la koncerna UK. Eble sociologoj kaj psikologoj tion povus oferi al niaj posteuloj. Tamen ne ĝuste pri tio ni traktos ĉi tie. Nialande la kongresaj preparlaboroj sufiĉe glate progresas kaj ni esperplenas sen ripoza momento. Fakte tio iusence bremsis niajn redaktlaborojn pri **AVANCO**, sed ĝi montriĝas nekontestebla bezono de nia landa esperantistaro. Plurfoje la estraro de nia Asocio levis al si tiun ĉi taskon, kiu post pluraj skizoj kaj streboj denove vidas luman horizonton. Estas tre evidente, ke la informa laboro antaŭkongresa ludos ankaŭ gravan rolon en la landa esperantistaro.

Dum la lastaj jaroj ni elprovis diversajn rimedojn por informi kaj la ĝeneralan publikon kaj la esperantistojn. Grave estas, ke super ni ne ŝvebas ĝeneraliga koncepto pri la sekteca karaktero de la Esperanto-movado en Kubo, kio ja estas rezulto de nia ĉiama strebado malfermi nian organizon al la ekstera mondo. Kompreneble, la tasko devas esti pluroble kribrita kaj ĝi devas trarompi skeptikemajn sintenojn. La momento plej taŭgas ol neniam. Tamen, argumentoj ofte mankas ĉe la plimulto da esperantistoj, sed paradokse ili posedas sufiĉan kvanton da materialoj por esti bonnivele informitaj; nu, jen pripensiga motivo, kiu nepre iel naskis ĉi-revuon. Do, ĝuste tiam ekrolas ĝi! Estu ĝi nia fonto kaj spegulo.

Ekde la jaro 1987 nia asocio je diversaj niveloj kaj regionoj, entreprenis kelkajn projektojn kaj aranĝojn sukcesajn; nacia kongreso; internacia konferenco; ekspozicioj pri fotoj, eldonaĵoj, poŝtmarkoj; kulturajn aranĝojn regulajn; kaj pasintdecembre la Scienc-Teknika Sekcio de KEA unuafoje okazigis Seminarion pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, organizita por informi sciencajn kaj teknikajn instituciojn de nia lando. Nu, la rezulton oni povas taksu je kontentiga nivelo rimarkinda. Aliflanke la internacia librofoiro pri kiu ni aparte raportas. Do, la intereso kaj streboj ne resti enfermitaj videbliĝas en ĉiu plenumita paŝo komunikcela. Sed ĉio ĉi bezonas iasence informan redoniĝon, oportunan sciigon taŭga kiel argumenta fono. Nia revuo denove ekrolas tiam. Ĝi devas esti ankaŭ tribunon kaj heroldo. Ĉar jam de antaŭ dek jaroj oni prisemis tigojn, tempopaso kaj faktoj rezultigas la unuajn florojn. Ilin nepre ni tenu vivaj. Ĉi-jare Kubo svarmos je Esperanto-arangoj: infanoj, instruistoj, fakuloj, junuloj, esperantistoj el diversaj mondpartoj alvenos soife pri konatiĝo kun la kuba movado; jen nia celo, aparte deca, ke la esperantistoj nialande estu kapablaj bone gastigi la tutmondan samideanaron. Ni celtrafe alstrebu la estontecon!

# QUIVICAN, SE TEMI PRI AVANGARDO ...

ORLANDO RAOLA G.

Ĉirkaŭ kvardek kilometrojn sude de la kuba ĉefurbo troviĝas vilaĝo *Quivicán*, meze de sukerkanaj kaj legomaj tre produktivaj plantejoj. Senhezite mi asertas, ke en tiu municipo okazis dum la lastaj tri jaroj, Esperanta miraklo (*la verkinto estas tute nekredema nekredanto N.R.*). Tiuj kiuj jam konas *Quivicán*, plejeble apogas la kvalifikon, sed se vi iom pridubas la sobrecon de mia taksado, informiĝu ĉisube kaj juĝu vi mem.

Komence de la jaro 1987, Ignacio Fuentes Pérez, Roberto Páez kaj Henri Hidalgo hobia korespondadis kun eksterlandanoj hispanlingve. Alvenis kelkaj leteroj kun sciigoj pri la Internacia Lingvo kaj ili tuj interesiĝis. La unuaj perleteraj kontaktoj estis kun esperantistoj el Bulgario, Pollando, Sovetunio kaj kun Ana María Molera el Moia, Hispanio. Ŝi bonvole havigis al ili la bazajn lernolibrojn kaj tute aŭtodidaktike ili eklernis Esperanton. Disvastiĝis en la ĉirkaŭaĵo la notico pri tiu lingvo por tutmonda paco kaj interkompreniĝo, lernata de manpleno da kuraĝuloj, kaj eĉ la lokaj registaraj instancoj pri kulturo interesiĝis pri la afero kaj esprimis sian pretecon helpi.

La novaĵo ĝisiris la ĉefurbon kaj "iuvespere", tute neatendite, aperis tie Jesús A. Castillo, la prezidanto de KEA mem, por informi al ili pri la ekzisto de plurjara organizita landa movado, al kiu ili tuj entuziasme aniĝis.

Poste Julián komencis pli organizitan instruagadon, la rezultoj tuj videblis: la Unuan Kongreson de KEA, 1987.12.04, partoprenis ok delegitoj el *Quivicán*.

1988 alportas novan impeton, laŭ la jena statistiko: meze de la jaro jam estis cent lernantoj, kolektive ili havis korespondadon kun Esperantistoj el 22 landoj. La municipa estraro de KEA ricevis oficialan agnoskon 1988.05.26, kaj kompreneble elektis Julianon kiel prezidanton.

La maturiĝon de tiu ĉi eksploda kaj kontaĝa emo al Esperanto markas la Internacia Konferenco *Esperanto 88*: grandan delegitaron ili

sendis tien, elstaris la unuaj E-artistoj el *Quivicán*, Octavio González kaj bruega rokgrupo, kaj tie oni organizis du vesperajn aranĝojn, kie ĉiuj niaj eksterlandaj gastoj kune kun multaj naciaj delegitoj manĝis, drinkis, dancis kaj amuziĝis ĝisstate.

Unu el la plej laŭdindaj ecoj de niaj kamaradoj tieaj estas, ke ili ne ebriiĝas pro la atingitaj venkoj, tiel ke ĉiam la afero pli kaj pli kreskas. Post kelkaj horoj de amikiĝa kontakto kun ili, oni povas konstati iliajn plej urĝajn bezonojn, cetero, tre komunaj dise tra la lando: paroladon, ĉiutagan praktikon, nuran polurigon de jam posedata sed ankoraŭ ne plene regata esprimilo. La provinca estraro de KEA en urbo Havano jam helpas ilin per vizitoj de spertaj E-instruantoj, pruntedono de lerniloj, k.c., kvankam la rezultoj ankoraŭ ne estas rimarkeblaj.

Ne nur plenaĝuloj lernas Esperanton tie. Ankaŭ kvardek kvin geinfanoj, dudek knaboj kaj dudek kvin knabinoj, inter ses kaj naŭ jaraĝaj dancas, kantas, deklamas, ĉion ili faras en Esperanto. La infana grupo *La Ora Aĝo* jam intense pretiĝas sin por partopreni la Infanan Kongreseton Havano 1990. Ilia gvidantino, Maira Núñez Hernández, agronomo, ĵus lerninte la bazan nivelon, ne nur instruas alies infanojn, sed ankaŭ sian filinon, cele al kreado de vere Esperantista familio. La infanoj soifas je en- kaj eksterlandaj kontaktoj. Jen ilia adreso: Lernejo "Celia de Cárdenas", Ave. 9, N-ro. 1401, Quivicán, 33500 La Habana, Cuba.

La atingoj de *Quivicán* estas ĝojigaj kaj nekonstestebaj. Ĉiam okazas tiel, kiam kuniĝas entuziasmo, kreivo kaj organizemo. Temas fakte pri modelo tre imitinda, precipe en tiuj lokoj nialandaj, kie paradokse, monatojn antaŭ la Universala Kongreso, Esperanto-pigruloj nur supraĵe rilatigas al la aktiva movado, la laboro de opaj estraranoj kaj eĉ de tutaj estraroj paneas, kaj malgraŭ la bonaj intencoj ĉe ĉies kapoj, la rezultoj kaŝiĝas neniu-scias-kie.

# BIOGRAFIO DE LA ALTA PROTEKTANTO POR LA 75a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO D-ro CARLOS RAFAEL RODRIGUEZ

Naskigis en provinco Cienfuegos la 23an de majo 1913. Li doktorigis en la Havana Universitato pri Civila Juro kaj pri Soci-politikaj kaj Ekonomiaj Sciencoj. Gajninto de la Nacia Premio «González Lanuza» kaj deklarita «Eminente Lernanto» de la Nacia Universitato. Li partoprenis la luktojn kontraŭ la tiraneco de Machado (1930-33) kiel membro de la Studenta Direktorio de Cienfuegos kaj oni nomumis lin Revolucia Urbestro ties urba post la tirana disfalo. Li rezignis tiun postenon depost kelkaj semajnoj kiel protesto pro la direkt-politiko de la provizora registaro. Enkorpiĝis en 1934 al la maldekstra Studenta Flanko en la Havana Universitato kaj aliĝis al la Kuba Kompartio en 1935. Li estis membro de la universitata komitato de strikoj (1935) kaj de la universitata studenta komitato, kiu estris la luktojn por reaktori de la Universitata Autonomio (1935-37).

En 1939 oni elektis lin estraranon de la Kompartio kaj ties daŭrigantoj Partio Unio Revolucia Komunista kaj Socialista Popola Partio.

Li atingis la Nacian Premion pri Ĵurnalismo kaj Eseo (1938), kunestris la revuojn «Resumo» kaj «Tagmezo» (1935-39), fondis la revuon «Dialektiko» kaj estis membro de la estra konsilio de la revuoj «La Komunisto» kaj «Fundamentoj» (1939-1959).

Li aktive partoprenis la kuban politikon kiel estrarano kaj maldekstrula kaj de la kontraŭfaŝismaj sektoroj dum la Dua Mondmilito. Farigis kaŝbatalanto kontraŭ la tirano Batista en marto 1952. En 1953 oni nomumis lin membro de la Nacia Ekzekutiva Buroo (sekreta politika buroo) de la Socialista Popola Partio, reprezentas la partion en pluraj internaciaj aranĝoj, elirante de la lando leĝe au eksterleĝe.

En 1954 li reprezentas la Socialistan Popolan Partion en la montaro Sierra Maestra sub estrado de d-ro Fidel Castro ĝis la revolucia triumfo, kunlaboris kun pluraj naciaj kaj eksterlandaj eldonantoj.

VICEPRESIDENTE  
CONSEJO DE MINISTROS

Ciudad de la Habana  
Mayo 17 de 1989  
"AÑO 11 DE LA REVOLUCION"  
5-497-89

Sr. Jesús A. Castillo  
PRESIDENTE DE LA  
ASOCIACION CUBANA DE ESPERANTO  
Ciudad

Estimado Señor Castillo:

En relación con su carta del 10 de Abril, sobre el Congreso Internacional de Esperanto, tengo el placer de informarle que acepto la responsabilidad que ustedes me asignan de patrocinar el Congreso, en función de las obligaciones que ella implica.

Al regreso de mi viaje le ruego hacer contacto conmigo, para resolver los pormenores.

Atentamente suyo.

  
Carlos Rafael Rodríguez

11

Post la revolucia triumfo li havis diversajn postenojn: Direktoro de la ĵurnalo «Novajoj Hodiaŭ», Direktoro de la Ekonomia Lernejo de la Havana Universitato, prezidanto (Ministro) de la Nacia Instituto de Agrara Reformo, membro de la Nacia Direkcio de Partio Unio de la Socialisma Revolucio de Kubo (PURSK), membro de la Nacia Komisiono de Ekonomika kaj Scienc-teknika Kunlaboro kaj membro de la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Kuba Kompartio, daŭra reprezentanto de Kubo en la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpo kaj Vicpremiero por la sektoro de Eksteraj Organismoj.


Ekde 1961 ĝis 1967, membro de la Estra Konsilio de la revuo «Kubo Socialista», teoria organo de la Kuba Kompartio. En decembro 1975 la Unua Kongreso de la Kompartio nomumis lin membro de la Politika Buroo de ties Centra Komitato.

Ekde 1975 li estas deputito al la Nacia Asembleo de la Popola Povo, kiu elektis lin Vicprezidanto de la Ŝtata kaj Ministra Konsilioj de la Respubliko, kaj okupiĝas pri la Ministerioj de Eksteraj Rilatoj, Ekstera Komerco, Kuba Nacia Banko kaj Ŝtata Komitato de Ekonomika Kunlaboro. Oni ratifis lin en la partiaj postenoj dum la Dua Kongreso (1980), kaj flanke de la Nacia Asembleo de la Popola Povo en la postenoj ŝtataj kaj registaraj.

Li estas membro de la estra konsilio de la revuo «Kubo Socialista» en ĝia dua etapo (1981). Ekde 1987 estas membro de la komisiono «Sudo», kiun prezidas Julius Njerere, prezidanto de pluraj delegacioj en internaciaj eventoj kaj ŝtataj kaj politikaj.

Li ricevis diversajn medalojn kaj naciajn distingojn, inter ili: medaloj «XXa Datreveno de la Revolucio» kaj «XXa Datreveno de la Revoluciaj Armfortoj», medalo de «Kaŝbatalanto» kaj «250a Datreveno de la Havana Universitato»; ordeno «Frank País» kiel instruisto kaj medalo «Batalanto de la Kolumno Unu José Martí». Ricevis diversajn ordenojn de la Respublikoj de Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Pollando, Rumanio kaj Francio, same kiel la ordenon «Stelo de la Interpopola Amikeco» de GDR kaj la ordenon de Oktobra Revolucio de Sovetio.

Havano, 1989-06-23



# AVANCKONKURSO

## AVANCKONKURSO

AVANCO intencas disvastigi inter ĉiuj siaj legantoj la emon al...LEGADO! Jes, ne bezonatas tro teoriojn por kompreni la gravecon de tiu plej baza intelekta kaj kleriga agado. Ni stimulu la konstantan riĉiĝadon de niaj geamikoj per ĉiuj rimedoj je nia atingo. Do, jen ni ekas. En ĉiu numero de nia revuo ni inkluzivos demandojn. Tuj sendu al ni la respondon poŝte. Se via respondo estas korekta, vi ricevos libropremion. Por tiuj kiuj plej multajn korektajn respondojn sendu dum la jaro, nia redakcio pretigos specialan omaĝan aranĝon.

Demando n-ro 1/1990

Julio Baghy estis gravega beletristo kaj aktiva movadano. Parolante pri li iu diris ie: "Li faris multajn malfacilajn taskojn por Esperanto; sed eble lia plej malfacila sindono estis tiu limigo de siaj verkistaj rimedoj. Li volis, kaj povis, flugi pli alten, sed, por servi la homaron, tranĉis la proprajn flugilojn".

Kiu diris tion? Kie ĝi aperis publikigita?

Respondoj validas dum la jaro, sed premioj nur iros al vi se vian respondon vi enpostigas antaŭ la apero de la venonta numero.

Sendu ilin al: KONKURSAVANCO  
pf. 2018, 10200 Havano, KUBO

KONTRIBUU TUJ !

# KULTURA PANORAMO

ORLANDO RAOLA G.

Saluton, karaj legantoj!

Pere de tiu ĉi nova rubriko, la Redakcio de **AVANCO** intencas tute apertan dialogon pri la plej valora ero de la fenomeno Esperanto: la Esperanto-kulturo.

Ĉiun duan monaton vi trovos ĉi tie komenton, recenzojn, sciindaĵojn, konsilojn ktp., kiuj ebligas al vi ĉiam pli kaj pli ĝui tiun mirindan senton de aparteneco al unika kulturo krom al via nacia.

Ĉu ni sukcesas aŭ ne en niaj streboj, tion vi devas nepre sciigi al la redaktoro, ĉar nur surbaze de via reĝio ni povos korektigi la direkton de niaj klopodoj.

Kaj nun, ek al la unua PANORAMO...

## NE KONVINKI LA KONVINKITOJN, SED PLIKONSCIIGI ILIN

Se vi legas kaj komprenas tiun ĉi paĝon, do mi povas supozi ĉe vi sufiĉan lingvoregon en la Internacia Lingvo Esperanto. Tiun vi certe akiris post iom pli malpli longa penado kaj studado, kaj plejeble vi ankaŭ estas informita pri kaj komprenas la komunikajn kaj kulturajn valorojn de nia lingvo kaj de la movado ĉirkaŭ ĝi. Do, mi povas aserti ke vi estas konvinkito, samideano (en la plej nobla senco) rilate la ideon de internacia komunikilo neŭtrala kaj eĉ ke vi pretas, laŭ viaj kapabloj, agi cele al ties disvastigo kaj pluevoluo.

Kaj nun ni kunanalizu, ĉu tio sufiĉas? Nur parte, mi respondas. Verdire, vi jam estas piedo en piedingo, sed ĉu jam surĉevale? Ĉu ni tuj ekrajdu?

Jen pri kio temas: via posedo de Esperanto ebligas al vi **aktive partopreni kulturon tute unikan en la mondo, kiu iel heroidas novan eraon de komuniko kaj plejsupera homa kreado.**

Se ĝis nun vi postrestis en tiu gravega konceptado, se ĝis nun Esperanto estis por vi nura hobia, tempopasigilo, io ekstera kaj eĉ duaranga, taŭga por sporadaj interŝanĝoj kaj iom da socia vivo, tiujn ĉi vortojn kaj tiun ĉi konstantan rubrikon mi dediĉas al vi.

## TRAFOLIUMANTE MONATO-n

En nuntempa Esperantio aperas diversofecce pli ol cent dudek revuoj kaj gazetoj. Mi tute ne troigas asertante, ke la Esperanto-gazetaro estas plej frapa montrofenestro pri la tutmonda agado de E-istoj. En historia perspektivo, la gazetoj agis kiel forta ligilo inter la entuziasmuloj de la Internacia Lingvo kaj ankaŭ en ili akumuliĝas nia tuta historio centjara.

# Monato

Pro ĉio ĉi, inter ĉirubrikaj celoj nepre viciĝos prigazetara laboro. Konscie pri materiaj-valutaj problemoj, kiuj malebligas liberan cirkuladon de eksterlandaj eldonaĵoj nialande, tamen mi instigu vin al gazetsoifo, kaj soifigite, vi iel aliel trovos la fontojn...

Jen **MONATO**. Ĝi sin nomas internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo. La unua rimarkinda trajto estas, ke **MONATO** utiligas Esperanton kiel esprimilon, tamen tute ne temas pri Esperanto-lingvo aŭ Esperanto-movado. Tiurilate versajne mankas

al ĝi konkurantoj. Tiu de 1989 estis la deka jarkolekto de *MONATO*, ĝi aperas la 15an de ĉiu *MONATO* kaj ĝin eldonas Flandra Esperanto Ligo (alivorte la landa organizaĵo de nederlande parolantaj belgoj) en urbo Antwerpen. Tamen la redaktoron vi nur trovos kelcent kilometrojn for, en urbo Augsburg, FRG. Li nomiĝas Stefan Maul, estas profesia ĵurnalisto kaj homo treege energia, kiu sukcese vivigis kaj pluflegas iaspecan tutmondan informreton pere de Esperanto, kaj revuon plej varian kaj allogan. Iam estonte la historiontoj rakontos pri la gravegaj kontribuoj de Maul kaj de *MONATO* al kreo de la lingvaĵo taŭga por paroli pri la mondaj ĉiutagaĵoj je la fino de la dudeka jarcento.

Nu, ni trapagu la paĝojn de la laste ricevitaĵ numeroj de 1989 (julio/oktobro).

*MONATO* havas konstantajn rubrikojn (same ni intencas havi en **AVANCO**, se vi konsentas). Ni nomu kaj glosu ilin: **LETEROJ**: du paĝoj trikolumnaj plenaj je kontribuajtoj de la *MONATO*-legantoj. Bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj el ili el Europo kaj Usono. Kaj la ceter'... simple malĉeestas. **NOTICOJ**: sur la sesa paĝo, mal-longe pri diversaj okazantaĵoj; **RAPORTOJ**: ĉirkaŭ dek kvin paĝoj, ja iom pli detale, opiniesprimaj superrigardoj en la mondajn kapturnigajn problemojn. Same kiel en la du antaŭe menciitaj rubrikoj, temas pri subskribitaj artikoloj. Oni povas legi en la kolofono, ke ili ne nepre kongruas kun la opinio de la redakcio. Kaj eble kelkfoje vi ankaŭ vive konstruistaras iun au alian skribaĵon. Ĉar vi trovos tie, de plej laŭdindaj studoj pri nuntempaj ekologiaj kaj teknologiaj problemoj, ĝis tre reakciaj artikolaĉoj verkitaj de ŝtoniĝintaj stultuloj. Tamen ĉiam vi povos reagi perletere al la redakcio, kaj ni ankoraŭ devos konstati ĉu la malferma *MONATO* ankaŭ malfermas por opinioj de ĉi tiuj sudlandanoj. **ESEO**: plej satinda rubriko, (se la jenaj aŭtornomoj de la kvar recenzataĵoj ne klarigas al vi la kialon, vi estas inter la legantoj por kiuj mi specife verkas kaj verkos **PANORAMON**): Stefan Maul, William Auld, Reto Rosetti kaj Paul Thorsen parolas pri lingvodetruado far komputistoj, ebleco de monda paco, ĉieesto de kreokapablo arta en la homoj kaj taŭrobataloj en His-

panio respektive. **KUIRRECPETO**: kial ne, ankaŭ tiu parto de la nacia kulturo internaciigeblas. Kaj miru, almenaŭ parte ĉiujn mi trovas realigeblaj en niaj aktualaj kondiĉoj. **CETERAĴOJ**: Mikspoto, kirlaĵo, ĉio-ĉio, nome: krucenigmoj, spritaĵoj, satiro, libreccenzojn, reklamoj, poemoj, noveloj, jam mi diris, ĉio. Nur kio mankas? Diru ke *MONATO* estas rice ilustrita per blanknigraj fotoj kaj desegnaĵoj, presita sur blanka papero, formato A4, ISSN 0772-456 X!

Esperable mi sukcesis vekti vian scivolemon pri la revuo. Tion mi intencis laŭ mia komenca konfeso. Nun la pilko trovigas ĉe via korto, se vi volas senpere konatiĝi kun tiu gravega eksponanto de Esperanto-kulturo, jen kieloj

- vizitu la bibliotekon de KEA (Neptuno 201 ce angulo de Industria, Centro Havano, prefere dum vesperoj). Tie vi trovos ne tro grandan kolekton, tamen...
  - petu de viaj korespondamikoĵoj en transpagi-povaj landoj donacan abonon al *MONATO*, kaj tiel kontrolu ĉu vi havas amikon au avarulon-korespondanton.
  - skribu al la eldonisto, FEL havas iun tiel nomatan Abonhelpa Fonduso, pere de kiu ili organizas bonfaron de riĉuloj por loĝantoj en la Tria Mondo. Jen la adreso: *Flandra Esperanto-Ligo*, Frankrijklej 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
  - kontaktu min persone en iu cefurba Esperantistejo, mi pruntedonas miajn ekzemplerojn, kiujn mi ricevas laŭ la antaŭa konsilo.
- Ĝis!

## EL "KULTURO KAJ INTERNACIA LINGVO" DE WILLIAM AULD

### La rolo de estetiko en lingvouzado

Kiam temas pri lingvokono oni povas distingi diversajn gradojn de posedo. Por miaj nunaj celoj sufcias distingi tri: la ĉiutagan, la klarigan, la artan.

Ĉiutaga lingvaĵo estas tiu, kiun oni uzas por ordinara babilado, kutime ĝi estas supraĵa kaj senkolora, uzanta vortprovizon relative malgrandan, en kiu ripetigas senfantazie ĉiam la samaj parolturnoj. Ĝi uzas abunde kliŝojn; novaj esprimoj rapide kliŝiĝas pro trouzado. Laŭ



sia karaktero ĝi estas relative malpreciza, sed la komunumo sukcesas subkompreni multon ne rekte esprimatan. La efektiva grado de subtileco, kompreneble, varias de individuo al individuo, sed kun tre maloftaj esceptoj ĝi restas tre baza kaj malsubtila komunikilo.

Klariga lingvaĵo estas tiu, kiu uzas ekzemple sciencistoj kaj instruistoj por komprenigi, kiel eble plej klare kaj nemiskompreneble iun teorion aŭ faktaron. Ĝi ofte postulas specialan vortprovizon (=ĵargonon) aparte lernendan, por ke la grado de konkreta ekzakteco aŭ provizeco en la esprimado de konceptoj estu kiel eble plej alta. Kutime tiu lingvaĵo do estas ekzakta, pragmatika, senkolora.

Arta lingvaĵo estas tiu, kiu esploras kaj ekspluatas la latentajn esprimivojn de la koncerna lingvo. Ĝin uzas ekzemple, verkistoj, poetoj, kaj advokatoj. Ĝi celas esti plejeble subtila, kolorplena kaj fresa; klišon ĝi klopodas eviti (kvankam ne malofte ĝiaj plej trafaj eltrovaĵoj eniras la ĉiutagan lingvon kaj klišiĝas). Ĝi estas aluda kaj implica. En ĝi abundas metaforoj. Beleco kaj eleganteco aparte karakterizas ĝin. Elstara ekzemplo de arta lingvaĵo en ĉiutaga kunteksto estas la Proverbaro Esperanta de Zamenhof. *[daurigota]*

## LERNU ESPERANTON!

Nia amiko prof. d-ro Attila Salga el Debrecen, Hungario, verkis la jenan varbilon por kursanoj de Scienca Universitato Lajos Kossuth en tiu urbo. Iomete adaptita al nia medio, mi reproduktas ĝin:

### MALAVANTAĜOJ

- vi devas lerni ĝin
- eĉ 3 kajerpaĝojn vi devas plenumi per ĝia gramatiko
- kiu foje eksentas ĝian specifan logikon, tiu ne povas deĉuti ĝin
- ĝiaj deklinacio kaj kojugacio estas neellerneblaj
- ĝia vortrezoro estas ne individua, sed internacia
- ĝi estas nenies gepatra lingvo
- ĉiulande troviĝas esperantistoj

- oni povas multe legi en tiu lingvo
- vi devas (Ĉu devas?) trapasi lingvoekzamennon.

### AVANTAĜOJ

- ĝi estas multe pli facile alproprigebla ol aliaj naciaj lingvoj.
- ĝia gramatiko estas simpla, por ĝi sufiĉas nur 3 kajerpaĝoj
- laŭ la logiko de la lingvo, novaj vortoj estas elformeblaj memstare, sen vortaro
- ĝiaj 16 reguloj ne havas esceptojn
- antaŭ la komenco de la studo vi jam konas kelkmilon da vortoj
- ĝi estas nenies gepatra lingvo, por kie ne elformiĝas en la parolanto interna komplekso
- interŝanĝaj vojaĝoj, internaciaj programoj kun rabatoj, konferencoj, senpagaj tranoktejoj, baze de "esperantisma altruismo"
- vi povas legi, publikigi en 80 landoj; la kono de Esperanto, la "esperantista vivsento" liberigas energion
- vi povas akiri socian rekonon ĉe klerigaj institucioj pro via lingvokono.

Ĉu plaĉa? Do traduku (eble ankaŭ inkluzivu la Esperanto-tekston) kaj metu en afiŝon!

Kaj feliĉe malfeliĉe mi alvenis al la rubrikfino. Mi atendas viajn leterojn aŭ personan pridebaton, se io plaĉis aŭ malplaĉis al vi, nepre diru al ni. Ankaŭ se vi deziras legi pri iu specifa temo, figuro, ĝenro, pri kio ajn, mi nepre satiĝos vian scivolon.

Ĝis aprilo!

# LIBROFOIRE EN HAVANO

MARITZA GUTIÉRREZ G

En la jaro 1986 Esperanto-stando partoprenis unuafoje en la Internacia Librofoiro de Havano ĉe la Kongresa Palaco. Tiufoje ni eĉ okazigis Esperanto-Konferencon, prezentis diverstemajn prelegojn kaj cetera. Sukcesplena aranĝo. Tiam vizitis nin, ankaŭ unuafoje la Ĝenerala Direktoro de UEA Simo Milojevic, kiu kompreneble partoprenis la foiron. Kelkaj jaroj pasis kaj nia Asocio klopodis profiti ĉiujn okazojn por malfermi sin al la ekstera mondo. Ĉi-jare alvenis nova sanco por librofesto esperantista, ĉar ekde la 6a gis la 12a de februaro okazis en PABEXPO, plej moderna kaj impona ekspoziciejo nialande, la IVa Internacia Librofoiro Havano 90 kun partopreno de 40 landoj kaj 4 internaciaj organizaĵoj. Entute 500 eldonejoj elmontris sian eldonagadon; nu, ankaŭ KEA denove prezentis, ĉi-foje pli riĉan, specimenaron pri la eldona fako de la Esperanto-komunumo. La stando estis je ses kvadrataj metroj granda kaj esperantistaj deĵorantoj klarigis dum tuta semajno ĉiaspecajn demandojn pri Esperanto.

La specimenaro inkluzivis beletran, infanan, sciencajn kaj teknikan literaturojn; lernolibrojn, revuojn kaj gazetojn, kiuj bildigis la eldonan agadon en Esperantio. La librofoiro estis plej bona kadro por informi pri la 75a UK okazonta la venontan julion. Granda kaj bela glufafiso reklamis la kongreson, kaj aparte sukcese efikis la prezento ĉe nia stando de la filmo Esperanto de Roman Dobrzynski, kiun oni antaŭe subtitoligis nialande. La publiko vizitanta la standon multe interesigis pri la IL kaj ties nuna situacio, la prikongresaj laboroj kaj ceteraĵoj; krome, estis venditaj kelkakvante lernolibroj de la argentinano Jorge Hess *¿Sabe Ud. Esperanto?* Fakte ĝi fulmrapide estis vorita de la soifanta publiko.

Aparte menciindas la stando de Ĉinio, kiu ekspoziciis pli ol dudek librotitolojn en Esperanto. Ni esperantistoj konsideris tion kvazaŭ mirinda ĝemeligo je eldona fako. Vere - laŭ nia opinio - montriĝas ege necesa, ke la

esperantistaro tutmonde instigu la eldonejojn, kiuj havas inter siaj laborlingvoj Esperanton, ke ili kunportu en internaciajn kaj naciajn librofoirojn ankaŭ sian Esperanto-eldonaĵojn. Fakte, ne ekzistas pli bona varbilo ol prezenti nian libromerkaton akirebla al la ekstera publiko, sciigante tiamaniere, ke ekzistas alia lingva elekteleco por doni informojn, sciigojn kaj generale kulturigi homojn.

La IVa Internacia Librofoiro estis vizitita, laŭ oficialaj statistikoj, de ĉirkaŭ 80 mil personoj dum sep tagoj, do ni esperantistoj povus konsideri vere efika aranĝo, ke almenaŭ duono el tiu kvanto konatiĝis kun la eldona fako de la Esperanto-komunumo, kio ne malofte miris la



libroamantojn kaj eĉ elstarajn figurojn de nia stato aŭ de la kulturo nialande, kiuj trairis la salonojn de PABEXPO dum la librofesto de Havano, kiel multajn nomis ĝin pro la vasta universo atingita, krom la kvanto kaj kvalito de libroj venditaj en pluraj havanaj librovendejoj dum tiu semajno. Ĝi estis vere kultura okazintaĵo, kie Esperanto meritis eĉ atenton de la nacia televido. Do, estas ĝojiga sperto imitinda kaj nepreteriasbla kie ajn tra la mondo.

# KONGRESA PAGO

—ALBERTO F. CALIENES

**75a Universala Kongreso de Esperanto**  
**14-21 de Julio, 1990**  
**Havano, Kubo**

**Adreso de LKK:** Kuba Esperanto-Asocio, poŝt-fako 2018, 10200 Havano, KUBO

**Loka Kongresa Komitato (LKK):** Prezidanto: *Jesús A. Castillo Jiménez*, vicprezidanto: *Julían Hernández Angulo*, sekretario: *Alberto Fernández-Calienes Barrios*, kasistino: *Maritza Gutiérrez González*, loĝigo: *Roberto Guthrie Ruiz*, ekskursoj: *Marta Alonso*, komercaj rilatoj/akcepta servo: *Alberto Rodríguez Pineda*, artaj aranĝoj: *Marín Castro López*, junularaj aferoj: *Jorge Castellanos*, gazetara servo: *Humberto Casanova*, enlanda informado: *Miguel A. Peñate Rivero*, eksterlanda informado: *Orlando Raola González*, infana kongreseto: *Niurka Alonso Santos*, giĉetoj: *Francisco J. Briel de Cañas*, kongresejestro: *Gustavo Morales de la Vega*, flugaranĝoj: *Isabel María Viera*, klerigaj aranĝoj: *Noel de la Noval Camargo*. Kaj nun pretiĝas tuta armeo da interpretistoj, ĉiĉeronoj, helpantoj kaj kunlaborantoj de LKK. Al tiuj, certe aldoniĝos niaj kolegoj el provincoj.

**Kongresa temo:** “Esperanto, evoluo, kultura diverseco”. Reĝisoro de la kongresa temo estos d-ro Jane Edwards, etnologo el Usono:

“Esperanto naskiĝis en situacio de kultura diverseco: amata fabelo de Zamenhof rakontas ke li rolis kiel interpretisto inter la komercistoj de Bjalistoko. Tiu rakonto estas por ni modelo de la vera bezono de la internacia lingvo. Kiam ni ĝuas la sperton de la internacia komunikado en niaj diversaj fakoj, kaj kiam ni entuziasme turismadas en la mondo, ni tamen devas memori la ĉiutagajn problemojn de tiuj kiuj parolas ‘la malgrandajn lingvojn’. Inter niaj idealoj de toleremo kaj interkompreniĝo devas elstari la kompreno de la vivrajto de la lingvoj kaj kulturoj de la evoluantaj landoj, fronte al la ekonomia forto de la superpotencoj.

La problemoj ĉirkaŭ la evoluo estas parte naciaj kaj parte internaciaj. Oni povas konsideri specifan agrikulturan projekton aŭ specifan klopodon inkluzivi etnan minoritaton en la juran aŭ politikan sistemon, kiel pure nacian demandon. Sed pli kaj pli ofte la problemoj fariĝas in-

ternacia, eĉ tutmonda, tiel ke la evoluo de la tuta terĝlobo fariĝas prioritata demando sur la tagordo de ĉiuj nacioj. La perdo de arbaro en unu mondparto efikas la veteron de la alia; la perdo de botanikaj aŭ bestaj specioj malfortigas la heredaĵon kaj la riĉecon de la mondo mem kiel sistemo, same la perdo de kulturoj kaj lingvoj nun ĉiujn malriĉigas.

“Ĉi-jare kiam ni kongresas unuan fojon en Kubo, taŭge ni pritraktos la temon de kultura diverseco kaj ekonomia evoluo. Cetero ni povos sekvi la kongresan temon iom pli intense kaj detale ol kutime. Okazos kvar kunvenoj pri la kongresa temo dum la kongresa semajno; parte en formo de prelegoj, parte en formo de diskut-grupoj kaj neformalaj ideo-interŝanĝoj. Nia intenco estas uzi tiun ĉi okazon por vere pligrandigi ian konon de la procedo de ekonomia evoluo en nia hodiaŭa ŝanĝiĝanta mondo, pere de laborgrupoj kun difinitaj celoj, kiuj utiligos la sperton de nia membraro kaj de la Havana komunumo.

“Ni konsideros la temon de la kultura diverseco duflanke: kun specifa aludo al la landoj kaj kulturoj de Latinameriko; kaj kun rigardo al la aliaj kontinentoj, inkluzive Orientan kaj Okcidentan Eŭropon. Ni esploros specifajn kazojn kiel modelojn de la procedo de la evoluo. Nur kiam ni iom komprenas la strukturon de la diversaĵaj situacioj de kultura kontakto, kaj ties rezultoj por la partoprenantoj, ni turnos nin al Esperanto.

“Certe ni multon lernos pri la intereseĝaj kulturoj de la indiĝenaj popoloj de Latinameriko, de la amazona ĝangalo ĝis la aztekoj kaj majanoj de Meksiko. Ni ankaŭ parolos pri la rezultoj de la diversaj eŭropaj evoluplanoj de la regiono, kaj klopodos kompreni la multajn politikajn kaj ekonomiajn kialojn de difinitaj alternativoj. Sur tiu ĉi bazo, ni demandos kio estas kaj kio devus esti la rolo de Esperanto en la ŝirmo de la minoritataj kulturoj, kaj eĉ demandos nin, ĉu nia movado faras sian eblon por plenumi tiun ĉi tre Zamenhofan celon.”

**43a Internacia Kongresa Universitato (IKU):** La 43a sesio de IKU okazos en kunlaboro kun la Havana Universitato, kies rektoro, d-ro Fernando Rojas, cetero membras la Honoran Komitaton.

12a Esperantologia Konferenco: Sub la gvido de d-ro Humphrey Tonkin kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) okazos la 12a sesio de tiu ĉi populara aranĝo. LKK volas aparte organizi laborsesion kun kubaj lingvistoj laŭ interkonsento kun la Kuba Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko de la Scienca Akademio.

Simpozio: "Evoluo en la latinamerika kunteksto". Certe tre intime ligita al la kongresa temo, la simpozio estas unu el la eblecoj eksporti nian UK-on al la ekstera mondo. Tie la Esperanto-komunumo aŭdigos sian starpunkton pri la aktualaj problemoj.

Debato: "Esperanto kaj aliaj solvoj de la lingvo-problemo". Dua premiero de tre ŝatata programero unuafoje lanĉita pasintjare en Brajtono, kiu kaptis la atenton ne nur de niaj kongresanoj. En Havano, ni esperas ankoraŭfoje spekti "sportisman malvenkon" de la kontraŭulo, (sed bv. lasi la homojn argumenti).

Filatelajfoj kaj numismatikafoj: Oni jam anoncis la aperon de speciala poŝtmarko kaj du moneroj okaze de la 75a UK. Unika ŝanco por kolektantoj!

Iom pli kompletan skizon de la kongresaj preparlaboroj vi ricevos en nia venonta numero post la aprila vizito de KKS al nia lando



46a IJK  
21-28 julio, 1990  
Playa Girón, Kubo

## SE TEMAS PRI JUNULOJ... FAKTOJ, NE PLU FANTAZIOJ

—ALEXIS OTERO

Prianalizante la laboron de la junulara sekcio (JS) nialande, oni povas aserti, ke ĝi nebone funkcias, malgraŭ meritinda agemo de unuopuloj, kiuj senlace strebis al plia evoluigo -ĉefe kvalita- de la laboro. Oni organizis, reorganizadis kaj de antaŭ longe intencis starigi veran JS-on, tamen preskaŭ ĉio restis kunside kaj surpapere; iufanka apogo aŭ forto mankis; aŭ mankoj ĉiam trafis nin. Kio okazis tiam? Anstataŭ pliibonigi la laboron kun la junuloj oni levis la demandon "kion ili faras?"

Domaĝe tiu respondo nepre bezonas la vortradikon "NENI" kaj aldone la substantivan finajn "O" akompanata de akuzativo "N" Mankis helpo, kelkfoje fido, sed ankaŭ niaflanke agemo ja mankis. Ekzemple: nia informilo AVANGARDO, neniam estis ĝustatempe eldonita kaj distribuita; en diversaj lernejoj oni fondis JS-n aŭ elektis aktivulojn pri junularaj aferoj. Dekomence la entuziasmo estis forta, poste ĉio defalis kaj tiel oni ne plu povis labori. En kongresa etapo oni elektis LKK-n el la tiamaj iom agintaj junuloj, sed ĝi ne bone laboris, ĝis tia grado, ke post la kongreso en Kerkrade kiun reprezentanto de nia IJK-LKK ĉeestis kun la celo akiri ĉiuspeciajn spertojn pri junulara kongreso, ni restis tiam nudaj kiel ni estis antaŭe, kio malbonefikis por la laboro de la tiam ĵuskreita LKK.

Ĉu nin gvidis la ĝusta kadro...? Respondon al tiu demando certe vi trovas ĉe la reorganizita nova estraro de la JS kaj kompreneble, de LKK, kiu alstrebas antaŭenigi la laboron, kaj jam oni vidas la unuajn rezultojn, precipe kiam oni legas la protokolon subskribitan kun la Kompartio en la provinco Matanzas- kie situas la kongresa sidejo- kaj la Unuigo de Junkomunistoj en Havano, pri kio ja atestas, ke Roberto Robaina, Unua Sekretario de la Nacia Komitato de tiu organizajo estas la Alta Protektanto de la 46a IJK. Fakte ion ni atingis, sed tio ne ŝufiĉas, ni antaŭeniros, ĉar sojle al la TEJO-Kongreso nialande, la junuloj ne plu povas sanceligi, do, nia nuna vojo estas. kuraĝe kaj agemoplene entrepreni la preparlaborojn por la baldaŭe okazonta IJK, kiu ja devos esti. se iel ni respektas nin mem. komplete sukceso

# HAVANO VOKAS... ESPERANTO-ELSENDOJ DE RADIO HAVANO KUBO



Jam la internaciaj radioelsendoj de Radio Havano Kubo en Esperanto fariĝis unujaraj. Sindone kaj kuraĝe la skipo preterveturis ĉiaspecajn malfacilaĵojn por havigi al la tutmonda aŭskultantaro ĉiudimanĉe duonhoran ĝuoplenan radiofeston. Nun ili pretas atingi eĉ pli rimarkindajn rezultojn dum la dua ekzistojaro.

Okaze de la datrevena aranĝo k-dino Milagro Hernández, estrino de RHK asertis, ke jam oni serioze analizas la eblecon fari ĉiutagajn radioelsendojn el Havano en Esperanto.


Tiucele bezonatas ĉies helpo. Kial? Ĉar nur se leterpluvo superŝutas la gvidajn instancojn de nia nacia kurtonda radiostacio la afero marŝos kontentige. Jam nia kongreso ĉepordas, ni ne malprofitu nian tempon. Sendu vian personan leteron al RHK, petu la ĉiutagigon kaj klarigu bonvolu, kial vi tion faras, kial la Esperantistoj bezonas tiujn progamojn. Ankaŭ konsidere akcelos la decidon, se vi instigas ĉiujn viajn amikojn kaj konatulojn, parolantojn aŭ subtenantojn de Esperanto agi same.

Jen nia mondo! (Ĉu kompreni Wells-ecce?) Sur iu punkto de tiu ĉi mapo, sur tiom malgranda insulo, ke ĝi tute ne videblas nudokule, troviĝas la plej juna Esperanto-elsendanto:

**RADIO HAVANO KUBO.**

Ni konkeru tiun mondon, skribu tuj!

$\tau$ UTC	$\nu$ (kHz)	$\lambda$ (m)	Regiono
0800-0820	11835	25.35	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
1700-1730	15340	19.56	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj
	15300	19.61	
	15285	19.63	
	11820	25.38	
	11760	25.51	
1830-1900	11705	25.63	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17800	16.85	
	15285	19.63	
2200-2220	11800	25.42	Eŭropo kaj Mediteranea Regiono
	17800	16.85	
2230-2300	15285	19.63	Norda, Meza kaj Suda Amerikoj
	11970	25.06	
	11950	25.10	
	11910	25.19	
	6165	48.66	



# LA LINGVO MEM...

*Ni daŭrigas nian prilingvan rubrikon per tiu ĉi bela peco. Temas pri la rezolucio de Akademio de Esperanto, pere de kiu la plej supera lingva institucio de Esperantio intencas meti finan punkton al la centjara diskutado. Ĉu tion ĝi sukcesos, multaj pridubas. Jen la teksto, poste eble ni publikigu kelkajn reagojn, kial ne la vian?*

## OFICIALAJ INFORMOJ DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

n-ro 9

Sendependa Lingvo-Instituto fondita de D-ro L. L. Zamenhof en 1905

### LISTO DE NORMAJ LANDNOMOJ

Tiu listo limiĝas al la geografiaj radikoj kiuj estas necesaj por ke ĉiu povu kunmeti la tradukon de la oficialaj ŝtatonomoj de la ŝtatoj-membroj de U.N. Tiu ĉi monda institucio efektive eldonis tian liston entenantan la oficialajn nomojn, kiujn la ŝtatoj donis al si mem: tiujn nomojn ili donis en la tri lingvoj Angala, Franca kaj Hispana.

Tio signifas, ke en tiu listo ni ne donas kompleksajn nomojn de ŝtatoj: ekzemple, tie oni ne trovas Germana DR sed nur Germanujo/ Germanio. Aliparte estas ŝtatoj, kiuj trudiĝas apartaĵojn de sia oficiala nomo al la ir ternacia publiko. Tio klarigas la motivon, pro kiu ni listigis landojn ofte nomatajn Britujo/Britio, Salvadoro kaj Lanko sub jenaj formoj: (Grand-) Britujo/Britio, (El-) Salvadoro kaj (Sri-)Lanko. La interkrampajon oni uzos aŭ ne uzos laŭ la grado de oficialeco, kiun oni deziras doni al la teksto. Ĉiuokaze estos ĉiam rekomendite formi simplajn ano-nomojn: Britoj, Salvadoranoj kaj Lankanoj.

La landnomoj apartenas al du klasoj: la ĉefa klaso estas tiu de Land-o—Land-anoj; ĝi entenas la grandan plimulton da nomoj. La dua klaso estas akcesora kaj koncernas nur malplimulton da nomoj; ĝi estas la klaso de Homoj—Homujo / Hom-io/Hom-lando. Fine, ni deklaru, ke tiu listo ne estis establita "ideale".

Ni devis kalkuli kun la kutimoj, kiuj establiĝis dum nia centjara historio. Apartan problemon kreis al ni tiaj landnomoj, kiuj en la uzado apartenis al du klasoj; la Akademio devis tranĉi la Gordian nodon, ne profite al unu nacio, sed ja por la monda profito de la tuta lingvo. Ĝi pardonpetas apud tiuj, kiuj —erare laŭ ni— sentus sin vunditaj de la faritaj elektoj. Ni nur agis por la bono de la tuta lingvo.

Mallongigoj:

<sup>f-to</sup>: Fundamento; la radiko estas Fundamenta.

<sup>\*8\*</sup>: Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro.

**I. Unua klaso de landnomoj (lando—landanoj)**  
Tiu klaso de "neŭtrale geografiaj nomoj" (Zamenhof), de kiu oni povas unuece formi la nomon de anoj per la sufikso -anoj, konsistigas la ĉefan klason de landnomoj en Esperanto: ĝi entenas la plej multajn el ili (c. 130 el 165). Plie ĝi obeas al la konstato de Boirac, unua Prezidanto de la Akademio: "La ĉefa kaj plej generala maniero estas nomi primitive la landon kaj devenigi la nomon de ĝiaj loĝantoj per la sufikso -anoj; la alia maniero... estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda".<sup>1</sup>

Afriko<sup>\*8\*</sup>, Algerio<sup>\*8\*</sup>, Andoro, Angolo, Antigvo, Argentino, Aŭstralio<sup>\*8\*</sup>, Aŭstrio<sup>2</sup>, Bahamoj, Bangladeŝo, Barbado, Barbudo, Barejno, Belizo, Benino, Birmo<sup>\*8\*</sup>, Bocvano, Bolivio<sup>\*8\*</sup>, Brazilo<sup>\*8\*</sup><sup>3</sup>, Brunejo, Burkino<sup>4</sup>, Burundo, Butano, Ĉado, Ĉilio, Domingo<sup>5</sup>, Dominiko, Ebur-Bordo, Egipto<sup>6</sup>, Ekvadoro, Fiĝioj, Filipinoj, Gabono, Gambio<sup>7</sup>, Ganao, Grenado, Grenadinoj, Gujano<sup>8</sup>, Gvatemalo<sup>\*8\*</sup>, Gvineo<sup>9</sup>, Ĝibutio, Haitio<sup>10</sup>, Honduro, Indonezio, Irako<sup>\*8\*</sup>, Irano<sup>\*8\*</sup><sup>11</sup>, Irlando<sup>\*8\*</sup>, Islando<sup>\*8\*</sup>, Israelo<sup>12</sup>, Jamajko, Jemeno, Jordanio, Kameruno, Kampuĉeo, Kabo-Verdo, Kanado<sup>\*8\*</sup>, Kataro, Kenjo, Kipro, Kiribato, Kolombio<sup>13</sup>, Komoroj, Kongolo, Koreo<sup>14</sup>, Kostariko<sup>\*8\*</sup>, Kubo<sup>\*8\*</sup>, Kuvajto, (Sri-)Lanko, Laoso, Lesoto, Libano<sup>\*8\*</sup>, Liberio<sup>\*8\*</sup>, Libio<sup>\*8\*</sup>, Lihtenŝtejno, Luksemburgo, Madagaskaro<sup>15</sup>, Malajzio, Malavio, Maldivoj, Malio, Malto, Maroko, Maŭricio, Meksiko<sup>\*8\*</sup><sup>16</sup>, Monako, Mozambiko, Nauru, Nederlando<sup>\*8\*</sup>, Nepalo, Neviso, Niĝero, Niĝerio, Nikaragvo, Omano, Pakistano<sup>\*8\*</sup>, Panamo<sup>\*8\*</sup>, Papuo<sup>17</sup>, Paragvajo<sup>\*8\*</sup>, Peruo<sup>\*8\*</sup>, Principeo,

Ruando, Salomonoj, (El-) Salvadoro, Samoo, San-Marino, Sao-Tomeo, Seŝeloj, Senegalo<sup>18</sup>, Sent-Kristofo, Sent-Lucio, Sent-Vincento, Siera-Leono, Singapuro, Sirio<sup>\*8\*</sup>, Sovetio<sup>19</sup>, Sudano<sup>\*8\*</sup>, Surinamo, Tajlando<sup>20</sup>, Tajvano, Tanzanio, Tobago, Togolo, Tongo, Trinidado, Tunizio<sup>\*8\*</sup>, Tuvalo, Ugando, Ukrainio<sup>21</sup>, Urugvajo<sup>\*8\*</sup>, Usono<sup>22</sup>, Vanuatuo, Vatikano<sup>23</sup>, Venezuelo<sup>\*8\*</sup>, Vjet-Namo, Zairo, Zambio, Zelando, Zimbabvo.

*Eksterliste:* Groenlando/Gronlando, Siberio.

## II. Dua klaso de landnomoj (Homoj-Homujo-Homlando...)

Tiuj landnomoj estas derivaĵoj de landanomoj kaj estas diverse formitaj: per sufikse uzataj vortoj (-land-, (i)stan-,...) aŭ per sufikso (-uj-, -i-). Tiu maniero formi la landnomojn "estas dua, akcesora, sekve en okazo de dubo neniam preferinda" (Boirac<sup>1</sup>). La sufikso -uj- "servas por elfari nomojn... de landoj, sed nur kiam oni nomas landon per la nomo de la gento aŭ nacio ĝin loĝanta" (Boirac<sup>1</sup>). La sufikso -i- en tiaj kazoj povas anstataŭi la sufikson -uj-, sed principe "nur se tiel ĝi formas internacian nomon" (Cart).

### 1a. grupo: sufikso -ujo aŭ sufikso -io

En tiu grupo la du sufiksoj estas egale uzeblaj; estas rekomendinde uzi nur unu saman en difinita teksto

*a. la io-formo estas sendube internacia*  
 Albanujo/Albanio<sup>\*8\*</sup>, Arabujo/Arabio<sup>\*8\*</sup>, Belgujo/Belgio<sup>\*8\*</sup>, Belorusujo/Belorusio, Bulgarujo/Bulgario<sup>\*8\*</sup>, Ĉeĥoslovakujo/Ĉeĥoslovakio, Etiopujo/Etiopio<sup>\*8\*</sup>, Francujo/Francio<sup>f-to</sup>, Germanujo/Germanio<sup>f-to</sup>, Grekujo/Grekio<sup>f-to</sup>, Hispanujo/Hispanio<sup>f-to</sup>, Hungarujo/Hungario<sup>\*8\*</sup>, Italujo/Italio<sup>\*8\*</sup>, Jugoslavujo/Jugoslavio, Maŭritanujo/Maŭritanio, Mongolujo/Mongolio, Norvegujo/Norvegio<sup>\*8\*</sup>, Rumanojo/Rumanio<sup>\*8\*</sup>, Somalujo/Somalia, Svedujo/Svedio<sup>\*8\*</sup>, Turkujo/Turkio<sup>f-to</sup>.

*Eksterliste:* Armenujo/Armenio, Estonujo/Estonio, Latvujo/Latvio<sup>\*8\*</sup>, Rusujo/Rusio<sup>f-to</sup>

*b. la io-formo estas Slave internacia sed de Latina deveno*

Danujo/Danio<sup>\*8\*</sup>, Portugalujo/Portugalio.

*Eksterliste:* Anglujo/Anglio.

*c. la io-formo estas ne internacia pro la uzata radikoj*

(Grand-)Britujo/(Grand-)Britio, Hindujo/Hindio<sup>24</sup>

*ĉ. la io-formo estas ne internacia, ĉar la radikoj devus aparteni al la unua klaso*  
 ili apartenas al la arkaikaj sistemo ("Amerikoj vivas en Amerikujo"). Sed ili estas tradiciaj, de ĉiuj uzataj kaj ne kontestataj.  
 Ĉinujo/Ĉinio, Japanujo/Japanio<sup>25</sup>

### 2-a grupo: sufikse uzata vorto lando

*a. la nomo estas sendube internacia*

Finnlando, Svazilando

*Eksterliste:* Skotlando<sup>26</sup>

*b. la nomo estas akceptebla Esperantismo*

Pollando, Svislando.

### 3-a grupo: sufikse uzata vorto -(i)stano

Afganistano

*Eksterliste:* Kirgizistano, Uzbekistano

## Ŝtatnomoj

Surbaze de la normigitaj landnomoj kiu ajn povos mem formi ŝtatnomojn helpante sin per pliaj vortoj troveblaj en la vortaroj. Ekzemple, surbaze de la nomo German-ujo/Germanio, eblos formi la ŝtatnomon Demokratia Germana Respubliko helpante sin per la vortoj demokratia kaj respubliko.

la plej multaj el tiuj "helpvortoj" jam estas Fundamentaj aŭ Oficialaj. Tamen kelkaj eĉ ne estas registritaj en PIV: ili enkondukiĝos per si mem laŭ la kreskanta uzado. Aliaj troviĝantaj en PIV meritis esti oficialigitaj, sed ni kontentigos enmeti ilin en anekso al la listo de normigitaj landnomoj: estas ja malfacile antaŭvidi daton de proksima Oficiala Aldono. Fine kelkaj derivitaj vortoj aperos ankaŭ en tiu anekso, kune kun kelkaj propraj nomoj. Ni do havos jenan liston plurpartan:

A. Vortoj ne-oficialaj aperantaj en PIV  
 domino—federala Islamo — kooperativo — nomarko — nomarkio — soveto — unio

B. Teritorioj regataj de diversaj tradiciaj estroj (kun la UNO-tradukoj al A.F.H.) duk-io (duchuduché, ducado) — emir-io (emirate, émirat, emirato) — princ-io (principality, principauté, principado) — reĝ-io (kingdom, royaume, reino) — sultan-io (sultanate, sultanat, sultanfa).

C. Adjektivoj kun politika senco (same kun tradukoj al A.F.H.) federativa (federativa, fédératif(-ve), federativo(-a) — socialista (socialist, socialiste, socialista(-a) — sendependa (independent, indépendant, independiente) — unia/unuigita/unuiginta (united, uni(e), unido(a))

C. Propraj nomoj de dinastioj (kun tradukoj al A.F.H) Hasima (Hashemite, hachémite, hachemito(-a)) — Sauda (Saudi, saoudite, saudito(-a))

#### D. Stataj regim-nomoj

Gamahirio (el la Araba: Jamahiriyah, lando de la amasoj). Komonvelto (el la Angla: Commonwealth, lando de komuna bonfarto).

1. Antaŭparolo al la *Plena Vortaro Esperanto-Franca kaj Esperanto-Esperanto* (1909)
2. Sed eblas diri: Austro-Hungario. Esence la radiko austr- signifas oriento; gi aperas kiel mallongigo de Austrio kunmetaĵoj.
3. La cefurbo estas Braziljo, lau la Portugala prononco
4. Faso (en Burkina Faso) ne tradukigas: gi signifas "hejmlando, patrio". Antaŭe: Supra Volto.
5. Ni reprenis malnovan nomon, car transskribo de *Dominicana* konfuzigus kun "anoj de Dominiko". Kp. noton 10.
6. Ekskluzive uzata en la cefverka traduko de Kabe "La Faraono". Ni preferu tiun formon omage al nia granda verkisto.
7. Pro peto de la Gambia Prezidento kaj interveno de Sengalo kreigis inter la du landoj konfederacio sub la nomo Senegambio (dec. 1981).
8. Gujano, nova nomo de sendependiginta stato (*Guyana*), kun cefubro Georgtano, eks-Brita Gviano (*Guyana*); apartenas al la regiono de Gvajanaoj, kune kun Surinamo (eksa Nederlanda Gviano) kaj la franca Gviano, krom la Venezuelo kaj Brazilo partoj de Gvajanoj.
9. Nomo de kvar statoj, el kiuj tri respublikoj: Res. Gvineo, Res. Gvineo-Bisauo (cefubro: Bisauo), kaj Ekvatora-Gvineo (antaŭe kaj respektive: Franca, Portugala kaj Hispana Gvineoj). La kvara estas monarkio Papuo-Nov-Gvineo (Vd. noton 17).
10. Respubliko Haitio okupas la okcidentan parton de la insulo Hispaniolo, dum la Dominga Respubliko la orientan.
11. Kun la Persa lingvo (kaj la iama Perujo/Persio).
12. Kun la Hebrea <sup>1-to</sup> lingvo.
13. Ne konfuzu kun Kolumbio, Usona federala distrikto kun cefurbo Vasingtono.
14. Nomo monde internacia. La Korea etno nomigas Hanoj; sinonimo por la lando Hanlando. Ne konfuzu Hanoj kun Hanoj, cefgento de Cinio.
15. Kun la Malagasa lingvo
16. Sed: urbo Meksiko au Meksiko-urbo (H. *Ciudad de México; A. Mexico City...*)
17. Papuo-Nov-Gvineo rezultas el unuigo de Nov-Gvineo sub protekto de Australio kaj de Papuo; ankau nomita Australia Nov-Gvineo; cetera la tria parto de la sama insulo estas al Okcidenta Nov-Gvineo, nun Iriano (dependaĵo de Indonezio). En Papuo-Nov-Gvineo estas parolataj c. 700 lingvoj kaj unu komuna, la Bislama (Bichelamar au melanezia pigino). Tieaj eŭropanoj parolas Angle.
18. Vidu noton 7.
19. Nepre utila pro sia derivaĵo: Sovetianoj; gi estas mallongigo por Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, kiun oni iafojke skribas sigle: USSR.
20. Iuj Tajoj estas naciajno de aliaj landoj: Birmo, Laoso, (Tajlaoj)...
21. La landnomo signifas proksimume: landlima lando. Tial estas eraro nomi per gi la landanojn.
22. Tradicia mallonga nomo por Uniaj/Unuigitaj Statoj de Ameriko (U. S. A).
23. Teritorio! Sed en Ekleziaj rilatoj kutimas uzadi: Sankta Seĝo (Rim. de U. N)
24. En tiu federala lando estas parolataj c. 14 oficialaj lingvoj stataj (la Hinda, Bengala, Telugua, Marata, Tamila, Urduo, Gugarata, Maljalama, Kannada, Orija, Pangaba, Asama, Kasmira, Sinda) — krom c. 125 aliaj parolataj de 13% de la popolo. Plie du lingvoj estas federalaj: la Angla (parolata de 1% de la popolo) kaj la Hinda (c. 30% de la popolo): Jam de pluraj jarcentoj la landoj nomigas en diversaj Hindiaj lingvoj "Bharata", au lau misformigoj de tiu sanskrita nomo; tiu oficiala nomo liveras sinonimon al nia lingvo: Barato.— La rivernomo Indo naskis diversajn nomojn: Indonezio, kaj Indo-Eŭropa (uzata jam de Cart kaj de Privat), Indo-Irana...
25. Sinonimo: Nipono.
26. Sed la Kanada provinco estas Nova Skotio (*Nova Scotia*).